

AMO 97 – Pacifika Progreso

Aktivula Maturigo – seminario

Januaro 2023

Enkonduko de Stefan MacGill

Strategio por la regiono

- Kiel vidigi Esperanton tra la Pacifika Regiono?
- Kiel krei pli fortan esperantistaron tra la regiono?
- Kiel proponi eblojn eklerni la lingvon?
- Kiel la Pacifiko konigu pli efike sian unikan kulturon al la cetera esperantista mondo?

La pacifika regiono

- Multaj el la insuloj en la Pacifiko estas iumaniere ligitaj kun eksteraj landoj:
- Havajo estas usona ŝtato.
- La Orienta Samoo havas ligojn kun Usono; La okcidenta kun Nov-Zelando.
- Nov-Kaledonio estas franca eksterlanda teritorio. Tahito havas ligojn kun Francio.
- Tio estas tre malkompleta listigo




Sugestoj por agado

- La landoj kun ligoj al la regiono formulu planojn por fortigi la Pacifikan movadon.
- Tiuj landoj uzu siajn lingvojn por prezenti bazajn informojn pri Esperanto, cele al la pacifikaj popoloj.
- Eluzu retajn eblojn prezenti Esperanton kune kun kurs-ofertoj
- UEA akceptu pli da verkoj (literaturaj, informaj) pri la regiono.

literaturo el la regiono


- AMO 86, prezento de tri Pacifikaj kulturoj (Nov-Zelando, Aŭstralio kaj Tahiti).
- EKO 2022-30, kiu prezentis tiujn antipodiajn verkojn.
- La verko Aŭstralia Antologio (Edistudio/UEA) en la serio de UEA 'Okcidento-Oriento. La sola verko el la regiono!)
- Sekvas elektitaj verkoj de kelkaj aŭtoroj el la regiono.



Bertram Potts, Nov-Zelando

- **Facila skeĉ-albumo.** *Bertram Potts.* **Teatraĵoj / Legolibroj**. Fonto. Chapecó. 1984. 112 paĝoj. Prezo: 10.50 €
Klarigo: Cent mallongaj skeĉoj por legado aŭ prezentado, taŭgaj por klasoj kaj klubvesperoj.
-
- **Poezia bukedo por geknaboj de la mondo.** *Bertram Potts.* **Simplaj legaĵoj kaj infanlibroj / Poezio originala**. Fonto. Chapecó. 2016 (2a eld). 100 paĝoj. Prezo: 17.40 €
Klarigo: Kvardek naŭ versaĵoj, ilustritaj nigre-blanke kaj kolore, taŭgaj por junaj esperantistoj. Enkondukaj vortoj de M. Boulton.

Bertram Potts, Nov-Zelando



Trevor Steele, Australio

- **Flugi kun kakatuoj.** *Trevor Steele.* Prozo originala / romanoj. FEL. Antverpeno. 2010. 254 paĝoj. Prezo: 15.60 €
Klarigo: Originala romano pri la invado kaj okupo de Okcidenta Aŭstralio far britaj enmigrintoj. Aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA.
- **Sed nur fragmento.** *Trevor Steele.* Prozo originala / romanoj. Mondial. Novjorko. 2020 (3a eld). 429 paĝoj. Prezo: 25.50 €
Klarigo: Biografia romano pri rusa antropologo en Suda Pacifiko fine de la 19a jarcento.
- Aĉetebla ĉe la Libroservo de UEA.
-
- **Aŭstralia Felix.** *Noveloj.* *Trevor Steele.* Prozo originala / rakontoj. IEM. Vieno. 1999. 132 paĝoj. Prezo: 12.90 €
Klarigo: Noveloj el la ĵusa pasinteco kaj nuno de Aŭstralio.

Trevor Steele, Australia





Viaj komentoj bonvenaj

Dankon pro via atento!